# 100-a Universala Kongreso de Esperanto

Lillo, 25 julio - 1 aŭgusto 2015

# DUA BULTENO



KONGRESA TEMO

## Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

# Enhavo


Bonvenon al la kongreslando ........ 2
La kongresejo ........ 3
Utilaj informoj pri Francio kaj Lillo ........ 4
Provizora programo ........ 5
Artaj aranĝoj ........ 6
Lingvaj kursoj kaj ekzamenoj ........ 7
Kiel mendi servojn? ........ 8
Hoteloj ........ 9
Ekskursoj ........ 13
- Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ........ 13
  - Antaŭkongresa ekskurso ........ 13
  - Postkongresaj ekskursoj ........ 15
- Ekskursoj dum la kongresa semajno ........ 16
  - Tuttagaj ekskursoj ........ 16
  - Duontagaj ekskursoj ........ 20
- Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ........ 21

Bankedo ........ 22
Pliaj informoj ........ 23
Kontaktinformoj ........ 24


# Loka Kongresa Komitato

| | | | |
|---|---|---|---|
| Prezidanto | Xavier Dewidehem | Gazetaro | Didier Loison |
| Ĝen. sekretario | Julia Hédoux | | Cyrille Hurstel |
| Kunordigo | Susanna Beglaryan | Publikaj rilatoj | Xavier Dewidehem |
| | Claude Nourmont | | Aleks Kadar |
| Kasisto | Jean Delhomme | | Michel Dechy |
| Akcepto | Véronique Bichon | Kultura programo | Raymonde Coquisart |
| | Martine Ragonnet | | Claude Nourmont |
| Loĝigo | Julia Hédoux | Ekskursa progr. | Katja Boen |
| | Michel Dechy | | Armelle Piolat |
| Loĝistiko | Sylvain Barrier | Spektakla progr. | Floréal Martorell |
| | Olivier Maury | | Melono Desnos |
| Tradukado | Jesper Jacobsen | Junulara progr. | Sébastien Denux |
| Ekstera informado | Bruno Flochon | | |
| | Lisa Bannier | | |


Dezajno kaj fotoj: Francisco L. Veuthey.
Kovrila foto: Picturyourdream.fr. Aliaj bildoj: p. 14: Bing; p. 11 OpenStreetMap.Org; p. 19: Freepik.es.

## 100-a Universala Kongreso de Esperanto

Lillo, 25 julio – 1 aŭgusto 2015

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

# Bonvenon al la kongreslando

## Ĝenerale

Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima franca diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ĝian adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi bezonas vizon kaj sub kiuj kondiĉoj.

UEA/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2015 kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj.

## Dokumentoj

Ĉiu vizitanto devas havi validan identigilon kaj tiuj de landoj ekster la Schengen-areo devas havi pasporton validan minimume ses monatojn post la forirdato, koncernan vizon kaj revenbileton.

La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA/LKK.

## Konfirmiloj kaj invitleteroj

Normale la Kongresa Konfirmilo devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco.

La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA sendos se oni petos ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn.

Bonvolu konscii, ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

## Datoj

Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (25 julio – 1 aŭgusto, eventuale plus daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj).Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

## Mongarantioj kaj asekuroj

Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon (depende de la civitaneco), necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri la pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla en via hejma flughaveno.

Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la tuta daŭro de la vojaĝo kaj restado.

## Alveno al Lillo

Al Lillo iras 6 ŝoseoj (A1, A22, A23, A25, A26 kaj A27/E42), regionaj kaj internaciaj trajnoj (inkluzive de la rapidaj trajnoj TGV al diversaj urboj en Francio kaj Thalys, kiu rekte ligas Lillon al Bruselo, Antverpeno, Roterdamo, flughaveno Schiphol/AMS kaj Amsterdamo) kaj busoj el diversaj urboj de Eŭropo.


La plej proksimaj flughavenoj estas tiuj de Lille-Lesquin (LIL – kun flugoj al kelkaj urboj en Eŭropo, Tunizio, Alĝerio kaj Maroko), la bruselaj Brussels Airport-Zaventem (BRU – konektebla al Lillo per nerekta trajna servo), Brussels South Charleroi Airport (CRL – kun rekta busa transporto al Lillo), la parizaj Charles de




# La kongresejo

La kongreso okazos en Lille Grand Palais, 1, Boulevard des Cités Unies, FR-59777 Euralille, Lillo, Francio. Eniro ĉe Boulevard Émile Dubuisson.

Por kongresrilataj aferoj bv. ne skribi al la kongresejo sed nur al la konstanta adreso de UEA en Roterdamo.



Gaule (CDG – kun rekta rapida trajnservo al Lillo) kaj Orly (ORY).

Lillo havas ĉirkaŭ 20 000 parklokojn kun tarifoj inter 1,30 kaj 1,60 eŭroj/hore kaj 7 parkejojn konektitajn al la metro-sistemo.



# Utilaj informoj pri Francio kaj Lillo

## Situo

Francio situas en la okcidento de Eŭropo, kvankam ĝi posedas ankaŭ transmarajn teritoriojn. Ĝia kontinenta areo ampleksas 545 630 km$^2$. Ĝi limas kun 8 landoj: Belgio, Luksemburgio, Germanio, Svisio, Italio, Monako, Hispanio kaj Andoro.

Lillo situas en la nordokcidento de la lando, proksime de la belga landlimo. Aliaj gravaj urboj krom la ĉefurbo, Parizo, estas Liono, Marsejlo, Tuluzo kaj Bordozo.

## Loĝantaro

Francio havas proksimume 64 000 000 loĝantojn. El ili, ĉirkaŭ 20% vivas en la ĉefurbo kaj la metropola areo.

En Lillo estas ĉ. 220 000 loĝantoj, sed tiu nombro kreskas al ĉ. 1 200 000 kun ĝia metropola regiono.

## Vetero kaj klimato

Lillo havas oceanan klimaton: somere ne tro varmas, vintre ne tro malvarmas.

## Lingvoj

La franca estas la oficiala lingvo. Multaj, ĉefe gejunuloj, kapablas paroli ankaŭ la anglan. Pro la granda kvanto de enmigrantoj eblas komunikiĝi per aliaj lingvoj.

## Mono

La oficiala mono estas eŭro (EUR).

Cirkulas moneroj de 1, 2, 5, 10, 20 kaj 50 cendoj kaj de 1 kaj 2 eŭroj. La monbiletoj estas de 5, 10, 20, 50 kaj 100 eŭroj (ekzistas monbiletoj de 500 eŭroj, sed tiuj kutime ne en la normala cirkulado).

Monŝanĝado eblas en la flughavenoj kaj en la multnombraj monŝanĝejoj en la urboj. Eblas preni monon ankaŭ el la bankaŭtomatoj.

En multaj lokoj eblas pagi per debetkaj kreditkartoj (Visa, Eurocard/MasterCard kaj American Express).

## Loka tempo

UTC +2 horoj.






# Provizora programo

Jen la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 25 julio** Malfermo de la kongresejo je 9h00. Alveno kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro kaj Interkona Vespero. Giĉetoj ĝis 18h00.

**Dimanĉo, 26 julio** Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Ekumena Diservo. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Franca Eksprese. Nacia Vespero.

**Lundo, 27 julio** Libroservo. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Franca Eksprese. Teatro. Bankedo. Kongresa Balo.

**Mardo, 28 julio** Libroservo. Tago de Kapabligo. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. La Estraro respondas. Franca Eksprese. Paroligaj Kursoj. Landa Agado. Delegita Reto. Societo Zamenhof. Teatro. Koncerto.

**Merkredo, 29 julio** Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 30 julio** Libroservo. Tago de la Libro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Paroligaj Kursoj. La CO respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Teatro. Koncerto.

**Vendredo, 31 julio** Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 1 aŭgusto** Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo je 14h00.

## Elektro

La elektra tensio estas 230-volta kaj la kontaktiloj estas rondaj dupolusaj.

## Telefonado

La prefikso por telefoni de eksterlando al Francio estas +33. Por telefoni de Francio al eksterlando: 00 + landa kodo + telefonnumero. Grava numero: (polico, fajrobrigado, urĝa medicina helpo): 112.

## Interreto

En kelkaj hoteloj, restoracioj, kafejoj ktp troveblas senpagaj retkonektoj. En la kongresejo estos senpaga sendrata retaliro.

## Medikamentoj

Receptoj estu latine skribitaj.

## Sanservo

Havu sanasekuron por la daŭro de la vojaĝo kaj restado en Francio. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

## Trinkmono

En restoracioj kaj kafejoj kaj aliaj manĝejoj kutime la trinkmono jam estas inkluzivita en la fakturo; vi povas esti certa pri tio se vi vidas la frazon *service compris*. Tamen, se la servo estis aparte bona kaj vi tion volas rimarkigi, 1 aŭ 2 eŭroj aŭ ĝis 10 procentoj de la fina sumo estos aprezataj. Ankaŭ aliaj servistoj, inkluzive de taksiistoj, aprezas trinkmonon.

## Trinkakvo

La kranakvo estas trinkebla.

## Enurba trafiko

La metroo, busoj kaj tramoj funkcias inter 5h30 kaj la noktomezo.

La prezo por biletoj varias inter € 1,50 se oni aĉetas nur unu bileton; € 12,50 por 10 biletoj (aĉetante ĉiujn 10 samtempe); 24-hora bileto (*day pass*) por € 4 k.a. Semajna transportkarto en la lilla regiono kostas € 17.

# Artaj aranĝoj

## Malkovriga Arta Scenejo (MAS)

Dum la UK en Lillo estos starigita, en centra loko de la kongresejo, la Malkovriga Arta Scenejo (MAS). Ĝi estos scenejo malferma al ĉiuj tiuj kongresanoj, kiuj deziros prezentiĝi antaŭ publiko. Ekipita per elektronika piano kaj sonsistemo, ĝi funkcios dumtage. Mireille Grosjean (Mirejo) kaj la kunordiga teamo, sub la gvido de Françoise Lévêque (Franjo), zorgos pri la sukceso de la aranĝo.

## Internacia Arta Vespero (IAV)

### Anticipaj sinproponoj

Kiel en ĉiuj UK-oj, ankaŭ en Lillo okazos la IAV, sed por la 100-a kongreso, cele al pli altnivelaj programeroj, estas petataj anticipaj sinproponoj/aliĝoj de la kandidatoj, por ke la organiza teamo povu pritaksi kaj elekti ilin jam antaŭ la UK.

IAV funkcios kiel konkurso en 3 etapoj:

1. Sendo, antaŭ 30 junio 2015, al iav@lille2015.fr, de: aliĝilo* kaj foto de la kandidato; prezento de la kandidato kaj de la programero; registraĵo de la programero (ligilo al mp3-dosiero aŭ video); teknika slipo*.

2. Prezento en la MAS, kie ĵurio elektos ĝis 5 kandidatoj.

3. La elektitaj kandidatoj prezentos po 15-minutajn spektaklerojn dum la IAV, kie la ĵurio elektos la plej bonan. Tiu ricevos kiel premion inviton por propra (minimume 45-minuta) spektaklo en la arta



# Lingvaj kursoj kaj ekzamenoj

## KER-ekzamenoj de UEA je tri niveloj

La ekzamensistemo de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro funkcias ekde 2009. Dum la UK okazas la ĉefa ekzamensesio de la jaro; tial ankaŭ en Lillo eblos trapasi la ekzamenojn je ĉiuj tri niveloj: B1, B2 kaj C1. Ekzameniĝi eblos ne nur en la kompleta formo, sed ankaŭ nur pri skriba aŭ parola partoj.

La ekzamensistemo estas ellaborita baze de la manlibro *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*. La sukcesintoj ricevos kvarlingvan (E-a, angla, franca kaj germana) diplomon, eldonitan de ITK, la ŝtate agnoskita ekzamencentro de Hungario.

La plurhoraj skribaj sesioj kaj la aŭdkomprena parto okazos vendredon la 31-an de julio, fruposttagmeze. Por la parola parto (20-minuta, individua) eblas elekti tempon laŭ la vico de la aliĝoj, antaŭ la UK aŭ surloke.

Interesiĝantoj povas peti ekzamenspecimenojn ĉe www.edukado.net. Pliajn informojn (postuloj, prezoj, statistiko, aliĝilo ktp) legu kaj akiru ĉe:

- la libro *Esperanto de nivelo al nivelo*;
- http://edukado.net/ekzamenoj/ker
- ker-ekzamenoj@edukado.net




### Franca Eksprese

Kiel kutime dum UK-oj, ankaŭ en Lillo estos bazaj lecionoj pri la loka lingvo. La celo estas helpi babili pri simplaj ĉiutagaĵoj.

Aliĝi eblos ankoraŭ dum la kongreso, sed por la parola parto la ekzamenebloj estas limigitaj: ju pli frua la aliĝo, des pli granda la ŝanco ricevi ekzamenlokon.

La ekzamenkotizoj varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. La kotizo antaŭpageblas per ĝiro al UEA-konto aŭ surloke ĉe la kongresa kaso.

## Paroligaj kursoj kun edukado.net

La porinstruista retejo edukado.net denove gvidos du paralelajn paroligajn kursojn — dufoje tage dum kvar tagoj de la UK-semajno, do entute ok fojojn. Ili celas komencantajn (A1, A2) kaj meznivelajn (B1, B2) parolantoj de E-o. Observantoj bonvenas. La kursmaterialo por komencantoj estas la eldonaĵo *Poŝamiko* (€ 5); en la alia nivelo oni estos petata kontribui al la kopikostoj. Antaŭa aliĝo ne necesas. Gvidos Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge.

---

programo de la 101-a UK kaj monsumon anoncotan de UEA. La dua plej bona prezentaĵo ricevos inviton partopreni en la IAV de la 101-a UK.

*Aliĝilo, ŝablono de teknika slipo, regularo de la IAV-konkurso elŝuteblas ĉe www.iav.lille2015.fr. La artan programon de la 100-a UK kunordigas Floréal Martorell (Flo) kaj Mélaine Desnos (Melono). La MAS- kaj la IAV-teamoj kunlaboras inter si.

# Kiel mendi servojn?

## Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

## Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

## Eniro kaj eliro

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde 15h00 de la mendita dato kaj necesas forlasi la ĉambron antaŭ la tagmezo de la lasta tago.

*Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligas la rezervon kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!*

## Dulitaj ĉambroj/hazarda kunloĝigo

La loĝiga servo ne povas aranĝi por-okazan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio du- kaj plurlitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj.

Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj kiuj nepre volas loĝi en du- aŭ plurlitaj ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, en la reta mendilo (http://uea.org/kongresoj/mendilo) troveblas anonctabulo.

## Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. El la reta mendilo eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

## Loĝkonfirmo

Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

## Ekskursoj

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi klare (preslitere) la koncernan parton de la mendilo.

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). *Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso.* Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami al tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno, vento kaj pluvo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝhandikapoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

### Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi ilin aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj kazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la mendo(j)n.

### Limdatoj

*La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2015.* Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio kaj nepre kontraŭ krompago (40 eŭroj por loĝado kaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj kaj 20 eŭroj por la ceteraj ekskursoj/ bankedo k.a.). *Eblas malmendi sen punpago nur ĝis la 15-a de aprilo 2015. Tamen tio kostos al la malmendanto 15 eŭrojn pro administrado.* Pri la ceteraj malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo. La mendilon kaj pagon bonvolu sendi ĉiam al la sama adreso.

### Plenumo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

# Hoteloj

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (€) por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono.
LGP = Lille Grand Palais (la kongresejo)

### Ofertataj servoj

Se ne estas menciite alie, la ĉambroj de la hoteloj havas klimatizilon, duŝejon, necesejon, senpagan retaliron, televidilon kaj la matenmanĝo estas inkluzivigita en la prezo. La 5- kaj 4-stelaj hoteloj havas ankaŭ fridujeton kaj sekurŝrankon en la ĉambroj. Iuj hoteloj havas propran parkejon; aliaj situas proksime de publikaj parkejoj. Sendepende de tio ĉu hotela aŭ publika, la parkado ne estas senpaga.

### 1. Hôtel Casino Barrière ★★★★★

▸ 777 bis pont de Flandres, Lille.
(500 m de LGP)

La hotelo havas 3 restoraciojn, 4 kafejojn, kazinon kaj teatron. Gastoj havas senpagan aliron al la saŭnejo. La ĉambroj estas izolitaj kontraŭ bruo.

*Ĉambro unupersona € 164;*
*dupersona € 93 p.p.*

### 2. Novotel Lille Centre Gares ★★★★

▸ 49 rue de Tournai, Lille (300 m de LGP)

La hotelo situas 2 min. for de la trajnstacio Lille Flandres kaj havas gimnastikejon. La duŝejoj havas ankaŭ bankuvon.

*Ĉambro unupersona € 139;*
*dupersona € 79,50 p.p.*

### 3. Suite Novotel Lille Europe ★★★★

▸ Boulevard de Turin, Lille (700 m de LGP)

La hotelo situas je kelkaj metroj de la trajnstacio Lille-Europe kaj havas kafejon kaj manĝaĵvendejon. En la ĉambroj estas mikroonda forno, senpaga mineralakvo kaj en la duŝejoj ankaŭ bankuvo.

*Ĉambro unupersona € 137;*
*dupersona € 78,50 p.p.*

*Per la reta mendilo viaj mendoj estas tuj traktataj. Krome vi povas realtempe sekvi, kiuj servoj restas disponeblaj.*

**4. Mercure Lille Centre Grand Place** ★★★★

▸ 2 boulevard Carnot, Lille (1,2 km de LGP)

Plene renovigita hotelo, situas en la koro de la urbo. En la duŝejoj estas ankaŭ bankuvo.

*Ĉambro unupersona € 145;*
*dupersona € 84 p.p.*

**5. Novotel Lille Centre Grand Place** ★★★★

▸ 116 rue de l'Hôpital Militaire, Lille (1,6 km de LGP)

Situante urbocentre, la hotelo havas restoracion, kafejon kaj estas je 10 minutoj piede de la trajnstacioj Lille Flandres kaj Lille-Europe.

*Ĉambro unupersona € 132;*
*dupersona € 76 p.p.*

**6. Ibis Lille Centre Grand Palais** ★★★

▸ 1 et 3 rue des Moulins de Garance, Lille (150 m de LGP)

La hotelo situas je 4 minutoj piede de la trajnstacio Lille Flandres. Ĝi havas 24-horan kafejon.

*Ĉambro unupersona € 95;*
*dupersona € 54,50 p.p.*

**7. Ibis Lille Centre Gares** ★★★

▸ 29 avenue Charles Saint-Venant, Lille (650 m de LGP)

La hotelo situas ĉe la trajnstacio Lille Flandres kaj havas propran parkejon.

*Ĉambro unupersona € 93;*
*dupersona € 53,50 p.p.*

**8. Ibis Styles Lille Centre Gare Beffroi** ★★★

▸ 172 rue de Paris, Lille (750 m de LGP)

Proksime de la trajnstacio Lille Flandres, ĝi havas propran parkejon.

*Ĉambro unupersona € 80;*
*dupersona € 47,50 p.p.*

**9. Ibis Lille Centre Grande Place** ★★★

▸ 21 rue Lepelletier, Lille (1,2 km de LGP)

La hotelo havas 24-horan manĝaĵvendejon kaj propran parkejon.

*Ĉambro unupersona € 101;*
*dupersona € 57 p.p.*

**10. Hôtel Campanile Lille Euralille** ★★★

▸ 23 allée Vauban, La Madeleine (1,9 km de LGP)

Situanta antaŭ la tramhaltejo Romarin, la hotelo havas kafejon, restoracion, terason, propran parkejon kaj la ĉambroj havas kontraŭbruan izolaĵon.

*Ĉambro unupersona € 120;*
*dupersona € 66 p.p.*

**11. Hôtel Balladins** ★★+

▸ 24 place de la Gare, Lille (700 m de LGP)

La antaŭ nelonge renovigitaj ĉambroj havas kontraŭbruan izolaĵon. En la hotelo estas restoracio sur la 7-a etaĝo kun panorama vido de la urbo.

*Ĉambro unupersona € 124;*
*dupersona € 69,50 p.p.*

**12. Hôtel Lille Europe** ★★+

▸ Avenue Le Corbusier, Lille (1 km de LGP)

La hotelo havas laborareon kun senpaga sendrata retkonekto, komputilo, printilo kaj skanilo, kuirejeton/manĝareon kun mikroonda forno (alirebla inter 5h00 kaj 0h00) kaj propran parkejon. La ĉambroj havas fridujeton kaj la duŝejoj ankaŭ bankuvon. Sen klimatizilo en la ĉambroj.

*Ĉambro unupersona € 80;*
*dupersona € 46 p.p.*

**13. Hôtel B&B Lille Centre Grand Palais** ★★

▸ 169 rue Berthe Morisot, Lille (850 m de LGP)

Situante je 5 minutoj de la metrostacio Lille Grand Palais, la hotelo havas propran parkejon.

*Ĉambro unupersona € 76;*
*dupersona € 43 p.p.*
*tripersona € 40 p.p.*




**14. Ibis Budget Lille Centre** ★★

▸ 10 rue de Courtrai, Lille (1,5 km de LGP)

Kore de la malnova urbo Vieux Lille, proksime de Porte de Gand, la hotelo havas propran parkejon.

*Ĉambro unupersona € 71;*
*dupersona € 40,50 p.p.*

**15. Appart'City Lille Euralille** ★★

▸ 30 les Jardins de l'Europe, Place Vauban, La Madeleine (1,9 km de LGP)

Tiu ĉi rezidejo proponas meblitajn, unu- aŭ plurĉambrajn apartamentojn kun hotelsimilaj servoj. En la ĉambroj estas sekurŝranko, manĝ- kaj labortabloj, fridujeto, mikroonda forno, kafmaŝino, manĝilaro, kuiraparato kaj kuirejaj iloj. La interreta aliro kostas 1 eŭron tage. La ĉambroj ne estas klimatizataj. Semajna purigado. La parkejo estas propra.

*Ĉambro unupersona € 98;*
*dupersona € 58 p.p.*

**16. Hostel Gastama**

▸ 109 rue de Saint-André, Lille (2,2 km de LGP)

Elektita de Hostel World France kiel la plej bona hostelo de Francio en 2014 la hostelo havas novindustrian dekoracion, originalan kaj modecan atmosferon, komunajn kuirejon kaj sidareon, komputilojn kaj senpagan retaliron. Krome estas

kafejo, vestaĵlavejo kun vestaĵsekigilo kaj 24-hore malfermita akceptejo.

Estas 4-, 6- kaj 8-litaj komunaj dormejoj, iuj ekskluzivaj por virinoj. La komunaj necesejoj/duŝejoj troviĝas en ĉiuj etaĝoj. Sub la litoj troviĝas sekuraj, individuaj ŝranketoj. Litotukoj estas disponigataj. Bantukoj ne estas disponigataj. Matenmanĝo inkluzivigita. Estas 5 unulitaj ĉambroj kun necesejo/duŝejo enĉambre (por tiuj ĉambroj ankaŭ la bantukoj estas disponigataj), 2 unulitaj ĉambroj kun komunaj necesejoj/duŝejoj (sen bantukoj), 2 dupersonaj ĉambroj (geedza lito) kun necesejo/duŝejo enĉambre (kun bantuko), 4 dulitaj (kun ĝemellitoj: unu super la alia) ĉambroj kun komuna necesejo/duŝejo (sen bantukoj) kaj 2 trilitaj ĉambroj kun privata necesejo/duŝejo kaj bantukoj. Krome troviĝas unu familia ĉambro, por kvar personoj, kun propra necesejo/duŝejo kaj bantukoj.

*Ĉambro unupersona (enĉambra necesejo) € 65; unupersona (komuna necesejo) € 54; dupersona (geedza lito) € 53,50 p.p.; dupersona (ĝemellitoj – enĉambra necesejo) € 41,50 p.p.; tripersona (enĉambra necesejo) € 39 p.p.; kvarlita familia (enĉambra necesejo) € 34,50 p.p.*

*Loko en dormejo kvarpersona (enĉambra necesejo) € 39 p.p.; kvarpersona (komuna necesejo) € 36 p.p.; sespersona (komuna necesejo) € 35 p.p.; okpersona (komuna necesejo) € 32 p.p.*

### 17. (Studentaj ĉambroj) Résidence Albert Châtelet

▸ 2 rue Frédéric-Combemale, Lille, metrostacio Oscar Lambret (4,2 km de LGP)

Individuaj ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo enĉambre. Sen klimatizilo kaj matenmanĝo. Komuna kuirejo. Mendebla nur por la kongresaj datoj! Studentoj devas montri pruvilon pri studenteco!

*Ĉambro unupersona (ne-studento) € 27; unupersona (studento) € 17.*

# Kromaj servoj

### Transporto

Semajna transportkarto “Pass Congrès” por vojaĝi per metrooj, tramoj kaj busoj en la metropola regiono de Lillo dum la kongresaj datoj. *Prezo € 17.*

### Manĝoj

Tagmanĝoj kaj vespermanĝoj, konsistantaj el antaŭplado, ĉefplado, fromaĝo, deserto kaj kranakvo, servataj en la Universitata Restoracio Debierre, 171 rue Charles Debierre (200 m de LGP). Estos varianto por vegetaranoj.

- 5 x tagmanĝoj (26-a, 27-a, 28-a, 30-a kaj 31-a de julio), inter 11h45 kaj 14h30. *Prezo € 45.*
- 6 x vespermanĝoj (25-a, 26-a, 27-a, 28-a, 30-a kaj 31-a de julio), inter 18h00 kaj 20h30. *Prezo € 54.*

**Paĝoj de LKK** kun informoj pri la urbo, programo, organizado ktp

**www.lille2015.fr**
**www.facebook.com/lille2015**
**www.twitter.com/lille2015**

# Ekskursoj

## Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

La antaŭkongresaj ekskursoj okazos en la plej famaj lokoj de Francio: Parizo kaj la Luarvalo. La postkongresaj ekskursoj vizitos Belgion (Flandrion kaj Bruselon) kaj Provencon.

La prezoj inkluzivas:
- restadon en komfortaj hoteloj 3-stelaj (A1, P1 kaj P2) kaj en Kastelo Grésillon (A2)
- matenmanĝojn kaj, se indikite, ankaŭ aliajn manĝojn
- transporton per komfortaj turismaj busoj kaj rapidtrajnaj vojaĝoj Lillo-Provenco
- Esperantlingvajn gvidantojn

La prezoj ne inkluzivas:
- ekstrajn elspezojn en la hoteloj/kastelo, ekz. telefonvokojn
- lunĉon, vespermanĝojn
- trinkaĵojn
- ekstrajn programerojn dumekskursajn
- trinkmonon

Se la ekskurso ne povos okazi laŭ la priskribo, estos proponata alternativo. Se iu(j) programero(j) ne povos okazi pro kialoj ekster la homa rego, ekz. katastrofo, UEA ne respondecos pri tiu(j) eventuala(j) nuligo(j).

## Antaŭkongresa ekskurso

A1 **Mirinda Parizo**
▸ 19-a – 24-a de julio, 6 tagoj / 5 noktoj

19.07 Alveno en Parizon kaj enhoteliĝo.

20.07 Matena vizito al la Quarter Latin, Palais kaj Jardin du Luxembourg kun, i.a. la Fontano de Mediĉoj. Lunĉo. Sekve vizito de la renoma Louvre-muzeo, de la Jardin des Tuileries, kie staras Carroussel, la plej bela arkitekturaĵo de la napoleona epoko. Vespermanĝo.

21.07 Matena vizito de la Operejo, de la Champs Elysées, la Eiffel-turo, Champ de Mars kaj Les Invalides, kie troviĝas la ĉerko de Napoleono. Lunĉo. Vizito al la urbodomo, la kvartalo Marais, Place des Vosges, rigardoj al la preĝejo Saint-Paul-Saint-Louis, al la nobeldomo Hôtel de Sully kaj Place de la Bastille. Vespermanĝo.

22.07 Matena vizito al Montmartre kaj la Basilique du Sacré-Coeur. Lunĉo. Sekve vagado tra la kovritaj stratetoj de Parizo: Passage Vivienne, Passage Colbert, Passage Verdeau. Vespermanĝo.

23.07 Matena vizito de katedralo Notre Dame (1163), de la Palais de Justice, la Sainte-Chapelle kaj la Conciergerie, kie i.a. Marie-Antoinette kaj Robespierre estis enkarcerigitaj dum la Granda Revolucio. Lunĉo. Vespere ŝipveturo laŭlonge de Sejno kun vespermanĝo.

24.07 Tuttaga vizito de la Versajla Palaco kaj ĝia 1738-hektara parko. Lunĉo. Transporto al Lillo. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 1085; dulita ĉambro € 890 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*



## A2 Luarkasteloj kaj Grésillon

▸ 20-a – 25-a de julio, 6 tagoj / 5 noktoj

20.07 Je 10h00 busa ekvojaĝo el la flughaveno Charles de Gaulle (CDG) al Grésillon tra Chartres. En Chartre vizito de la fama gotika katedralo kaj lunĉo. Alveno en Grésillon, enloĝiĝo kaj manĝo.

21.07 Ekskurso al Angers kaj al Fontevraud, pikniko apud la rivero Luaro ĉe la Kastelo Monsoreau. La 17-tura Mezepoka kastelo de Angers enhavas la tapetaron pri la Apokalipso (ĉ. 1370). En la muzeo Jean Lurçat troviĝas i.a. la fama murtapiŝo *Kanto de la Mondo*. Vizito de la 900-jara Abatejo de Fontevraud: origine monaĥ(in)ejo sub la estreco de "La Abatino"; dum la 17-a jc nobelinoj ricevis kristanan edukon tie. Sub la napoleona rego la loko iĝis malliberejo, fermita nur en 1963. Daŭrigo al Baugé kaj vizito de la historia apoteko. Vespermanĝo.

22.07 Vizito de la Kastelo Langeais, kie la reĝo Karlo la 8-a edziĝis en 1491 kun Ana de Bretonio. Daŭrigo al la kastelo de la urbeto Azay-le-Rideau, juvelo de la renesancaj konstruaĵoj. Lunĉo. Antaŭ la reveno, vizito de La Devinière, kie naskiĝis Rabelais, fine de la 15-a jc. Vespermanĝo.

23.07 Ekskurso al la naskiĝkastelo de Ludoviko la 12-a en la urbo Blois.
La "nova" alo, en renesanca stilo, estis mendita de Francisko la 1-a, kiu konstruigis ankaŭ la proksiman Kastelon Chambord. Malgraŭ ĝia grandiozo, li ne loĝis en la kastelo sed uzis ĝin nur por ripozi post ĉasado. Tagmeza pikniko. Vespermanĝo.

24.07 Vizito de la domo kie vivis Leonardo de Vinĉi en la urbo Amboise. Lunĉo. Konatiĝo kun la Kastelo de la Damoj (komunumo Chenonceau, proksime de Amboise), kie vivis Diana de Poitiers kaj Katarina de Mediĉoj. Vespermanĝo.

25.07 Ekskurso al Versajlo, pikniko, vizito de la kastelo kaj parko, kaj forveturo al Lillo. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 680; dulita ĉambro € 615 p.p.; kvarlita ĉambro € 530 p.p.*

*Por mendi ekstrajn noktojn en Parizo bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

# Postkongresaj ekskursoj

## P1 Flandrio kaj Bruselo — Belgio

▸ 1-a – 6-a de aŭgusto, 6 tagoj / 5 noktoj

1.08 Post la fermo de la UK, busa veturo al Gent. Enhoteliĝo kaj libera tempo. Tipe flandra vespermanĝo kun biergustumado kaj prelego.

2.08 Piedira promenado tra la urbo Gent, "la plej bone kaŝita sekreto de Belgio" pro la harmonia miksaĵo inter mirinda pasinteco kaj vigla nuntempo. Ĝi estas la plej granda universitata urbo en la lando, kun sentebla tia etoso. Vizito de i.a. la Katedralo de Sint-Bavo. Tie troviĝas la Dia Ŝafido-pentraĵo de la fratoj Van Eyck; supreniro en la belfrido por panorama vido al la urbo. Vizito de la impona grafa kastelo de la 12-a jarcento. Vespermanĝo.

3.08 Busa veturo al Ieper kaj la regiono. Vizito de diversaj milittombejoj de la Unua Mondmilito, kiel Tyne Cot, Vladslo kun ĝia kortuŝa statuo *La afliktitaj gepatroj* de Käthe Kollwitz. En la urbeto Diksmuide vizito de la pacmemorloko IJzertoren kun panorama vido al la batalkampoj. Ĉeesto en Last Post: ĉiutaga honorigo al militpereintoj. Vespermanĝo.

4.08 Vojaĝo al Antverpeno, la dua plej granda urbo kaj la ĉefa haveno de Belgio, ege grava eŭropskale meze de la 16-a jarcento kaj hejmo de mondfamaj pentromajstroj kiel Paul Rubens kaj Pieter Breughel. Nuntempe ĝi estas konata pro kulturo, modo, artoj kaj diamantkomercado. Vizito de la moderna ĉefstacidomo, la nova muzeo MAS pri la urba historio kun ĉ. duonmiliono da ekspoziciaĵoj sur kvin etaĝoj. Antverpenano malkovrigos la malnovan urbon. Kafopaŭzo en La Verda Stelo, unu el la plej malnovaj Esperanto-kluboj en la mondo. Vespermanĝo.

5.08 Ekskurso al Bruselo, la ĉefurbo de Eŭropa Unio, kalejdoskopo de kulturoj kaj lingvoj, kie la norda kaj suda Eŭropo renkontiĝas. Konatiĝo kun la urbocentro, la belega Granda Placo, *Manneken Pis* (Pisuleto), tipaj bruselaj galerioj, arĥitekturaj perletoj de *Art Nouveau*, la okgloba Atomium kaj aliaj tipe bruselaj aferoj. Estos okazoj aĉeti la famajn bruselajn vaflojn, ĉokoladon kaj bruselajn puntoverkojn. Vespermanĝo.

6.08 Post la matenmanĝo elhoteliĝo, busa veturo al Lillo kaj fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 834; dulita ĉambro € 659 p.p.*

*Por mendi ekstrajn noktojn en Lillo, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

## P2 Historia Provenco kaj Lazura Marbordo

▸ 1-a – 7-a de aŭgusto, 7 tagoj / 6 noktoj

1.08 Forveturo per TGV-trajno al Avignon je la 13h03; alveno je la 17h07.

Enhoteliĝo. Vespermanĝo dum krozado sur la rivero Rodano.

2.08 Post matenmanĝo, pieda vizito de la Papa Palaco, la fama ponto de Avignon Saint-Benezet, remparoj. Tagmanĝo. Libera posttagmezo. Vespermanĝo.

3.08 Forveturo al la romiepoka Arles. Vizito de la romiaj ruinoj, amfiteatro,

cirko, teatro. Aŭtobusa vizito de la urbo. Tagmanĝo. Vespermanĝo.

4.08 Forveturo al Aix en Provence, la ĉefurbo de Provenco. Vizito de la urbo, ĝiaj fontanoj kaj famaj domegoj de nobeluloj el la 17-a jarcento. Tagmanĝo. Vespermanĝo.

5.08 Forveturo al Marsejlo, fondita en 600 AK. Vizito de la Malnova Haveno, la Surmonta Preĝejo, Kastelo de LF; novaj muzeoj konstruitaj okaze de la elektiĝo de Marsejlo al Eŭropa Ĉefurbo de Kulturo en 2013. Tagmanĝo. Vespermanĝo.

6.08 Vizito de Nico, juvelo de la Lazura Marbordo. Oni rimarkos la romian, italan kaj francan influojn en la urbo. Promeno laŭ la fama Promenejo de la Angloj. Ebleco bani en la mediteranea maro. Tagmanĝo. Vespermanĝo.

7.08 Reveno al Lille per TGV-trajno je la 9h27. Estos ebleco halti en la flughaveno de Parizo Charles De Gaulle (CDG).

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 1090; dulita ĉambro € 940 p.p.*

*Por ekstraj noktoj en Parizo aŭ Lillo, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

Paralele kun la kongresa programo okazos ekskursoj en Lillo, ĝia ĉirkaŭaĵo, Parizo kaj Bruĝo kaj Ieper en Belgio, de sabato (25-a) ĝis vendredo (31-a julio). La ĉiĉeronado estos farata de esperantistoj, volontule. Se ne alie indikite en la priskriboj, la ekskursoj estas busaj. La prezo inkluzivas la enirbileton al la vizitataj lokoj (krom se alie indikite).

## Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 29-a de julio, sed ankaŭ en aliaj tagoj. Se indikite, la ekskursoj inkluzivas manĝon. La trinkaĵoj ne estas inkluzivigitaj.

### E1 — E1 Bulonjo-ĉe-Maro – Ceremonio memore al la 1-a UK

▸ Merkredo 8h00 – 20h15 Prezo: € 115

La romiepoka Bulonjo iĝis fama pilgrimejo en la 12-a jarcento pro apero de statuo de la Virgulino ĉe la marbordo. En tiu sama periodo disvolviĝis la haringokaptado. Ankoraŭ videblas fortikaĵoj kaj kastelo el tiu tempo. Strategia por Napoleono en la 19-a jarcento, Bulonjo iĝis fama banloko kaj la ĉefa fiŝkapta haveno en Francio kaj i.a. estis konstruitaj fervojo al Parizo. En 1848 la katedralo estis rekonstruita. La urbo havis grandan kulturan floradon en la periodo kiam okazis en 1905 la unua monda Esperanta Kongreso, kiun partoprenis ankaŭ Zamenhof. Bazo por la angla armeo kaj rifuĝejo dum la 1-a Mondmilito kaj preskaŭ komplete (85%) detruita dum la 2-a Mondmilito, Bulonjo estis rekonstruita kaj nuntempe ĝi disvolviĝas ĉefe turisme, pri arto kaj historio, kaj fiŝkapte.

Dum la ekskurso vi partoprenos la oficialajn ceremoniojn memore al la UK en 1905: akcepto fare de oficialuloj en la kongresejo de 1905; komuna piedirado ĝis la stacidomo, kie alvenis la kongresanoj; memorceremonio ĉe la statuo de Zamenhof; urbestra invito en la urbodomon kun servado de speciala vino; manĝado en restoracio.

Posttagmeze, libera vizito de aŭ la fama akvario Nausicaá [nozikaa], aŭ la malnova Bulonjo, aŭ la urbo Wimereux [vimero'], banloko de la 19-a jarcento.

*La ekskurso estas nekonsilinda por homoj kun marŝproblemoj.*

## E2 Bulonjo-ĉe-Maro – la urbo de la 1-a UK (Nausicaá)

▸ Mardo, ĵaŭdo kaj vendredo 8h30 – 18h30 Prezo: € 80

Konatiĝu kun la placo apud la stacidomo, kiun Zamenhof atingis por la unua kongreso en 1905 kaj la teatro, kie li faris sian faman paroladon. Posttagmeze, post lunĉo, vizito de Nausicaá, centro de scienca kaj teknika kulturo pri malkovro de la mara medio, kie troviĝas ankaŭ 40 akvarioj kun 4,5 milionoj da litroj da marakvo entenantaj 36 mil marajn speciojn el la tuta mondo kaj ĉiuj terarioj. Ĝi celas "malkovrigi kaj amigi la maron" per ludoj kaj klarigoj pedagogiaj kaj sciencaj montrante la homa-maran rilaton.

*La ekskurso estas nekonsilinda por homoj kun marŝproblemoj.*

## E3 Bulonjo-ĉe-Maro – la urbo de la 1-a UK (Wimereux)

▸ Mardo, ĵaŭdo kaj vendredo 8h30 – 18h30 Prezo: € 60

Konatiĝu kun la placo apud la stacidomo, kiun Zamenhof atingis por la unua kongreso en 1905 kaj la teatro, kie li faris sian faman sian faman paroladon. Post lunĉo, vizito de la ĉarma banloka urbeto Wimereux, konstruita ĉefe en la fino de la 19-a jarcento.

La kongresanoj de 1905 vizitis ĝin kaj tie spektis ĉevalkuradon. Vi malkovros la promenvojon laŭ la marbordo kaj la belan plaĝon. Estos klarigoj pri la loka arkitekturo kaj la tiama etoso dank' al la asocio Charme de Wimereux.

*Ne taŭga por tiuj kun marŝproblemoj.*

## E4 Bulonjo-ĉe-Maro – la urbo de la 1-a UK (Malnova Urbo)

▸ Mardo, ĵaŭdo kaj vendredo 8h30 – 18h30 Prezo: € 60

Konatiĝu kun la placo apud la stacidomo, kiun Zamenhof atingis por la unua kongreso en 1905 kaj la teatro, kie li faris sian faman paroladon. Post lunĉo vizito de la Malnova Urbo. Konatiĝo kun parto de ĝia longa historio, kie okazis la unua Esperanta Kongreso. Vi promenos tra malgrandaj stratoj por malkovri la katedralon, la mezepokajn fortikaĵojn kaj stratojn kaj la kastelon. Promenante sur la remparoj, vi ĝuos belan panoramon de la urbo.

*La ekskurso estas nekonsilinda por homoj kun marŝproblemoj.*

## E5 Amieno kun lumspektaklo

▸ Merkredo 14h00 – 1h00 Prezo: € 56

Amiens [amien'], "la malgranda norda Venecio" pro siaj multaj kanaloj en la mezepoka kvartalo Saint-Leu, estas fama pro sia gotika katedralo, unu el la plej grandaj en la mondo (Monda Heredaĵo de Unesko). En someraj noktoj ĝi retrovas siajn iamajn kolorojn ĉe rava lumspektaklo.

Post busa rondveturado en la urbo, piede vi vizitos la kvartalon Saint-Leu, la katedralon kaj la muzeon Jules Verne (iama loĝejo de la fama verkisto). Vespermanĝo kaj iom da libera tempo antaŭ la nokta spektaklo. Reveno al Lillo postnoktomeze.

*Ne taŭga por homoj kun marŝproblemoj pro longa piediro kaj ŝtuparoj.*

## E6 Ipro: Passchendaele-Muzeo kaj Unua Mondmilito (Belgio)

▸ Merkredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 55

Ĉe Ieper [iper] ni vizitos la Memorial Museum Passchendaele 1917. La vilaĝo Passendale estis tiujare loko de unu el la plej sensencaj homoferadoj de la Unua Mondmilito dum brita ofensivo por trarompi la germanajn liniojn: 500 000 homoj estis murditaj por gajni nur 8 km da tereno. La muzeo vivtenas la memoron pri la tiama batalo per fotoj kaj filmoj, ampleksa kolekto de historiaj objektoj kaj vivsimilaj scenoj. Okulfrapaj estas la rekonstruitaj subteraj koridoroj kaj tranĉeoj. Lunĉinte, ni buse iros i.a. al Tyn Cot, la plej granda brita milittombejo sur la kontinento, kaj al la germana Soldaten-Friedhof kaj poste al Menenpoort.

## E7 Biciklado preter memorlokoj de la Unua Mondmilito (Belgio)

▸ Merkredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 50

Post busa vojaĝo al Ieper ni biciklos 35 km de la Vredesroute (itinero de la Paco).

La regiono ĉirkaŭ Ipro, strategie grava dum la Unua Mondmilito, abundas je memorlokoj, precipe milittombejoj kaj estas en si mem denunco kontraŭ ĉia milito.

La itinero kondukos nin laŭ la plej fifamaj memorlokoj: Menenpoort — impona konstruaĵo honore al la militpereintoj; Tyne Cot-tombejo, Soldatenfriedhof. Reveno al Lillo per buso.

Ni manĝos sandviĉon dumvoje.

*Bv. atenti pri la distanco kaj pri la fakto, ke en la regiono kelkfoje pluvas. Portu taŭgajn ŝuojn kaj vestaĵojn. Ne taŭga por homoj, kiuj ne kutimas bicikli.*

## E8 Vert'Tige – biciklado al ekologia bieno

▸ Mardo kaj ĵaŭdo 9h30 – 16h30 Prezo: € 8

Ni trankvile biciklos ĝis la ekologia farmbieno Vert'Tige. Tie eblos aĉeti i.a. panon, fromaĝon, fruktojn ktp.

Bv. atenti pri la distanco (40 km tienreen) kaj ke en la regiono kelkfoje pluvas. Ekskurso por oftaj biciklantoj.

## E9 Araso kaj la memorlokoj de la Unua Mondmilito

▸ Merkredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 50

Buse ni vizitos ĉe Arras la memorlokojn de la Unua Mondmilito: Vimy, kie ni promenos en la tranĉeoj, tra la tuneloj kaj tra kanadaj, britaj, germanaj kaj ĉeĥaj tombejoj. Ni vizitos la preĝejon Notre Dame de Lorette.

Post lunĉo ni piede vizitos la urbon kaj ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn, inter kiuj elstaras la renesanca urbodomo kaj la "Granda placo" (Grand'-Place) kaj "Malgranda placo" (Petite-Place), ĉirkaŭitaj de domoj rekonstruitaj laŭ la iamaj 17-aj jarcentaj (detruitaj dum la Unua Mondmilito). Fine ni vizitos Carrière Wellington, iaman ŝtonminejon, memorlokon pri la granda Arasa batalo.

*La ekskurso ne estas konsilinda por homoj kun marŝproblemoj.*

## E10 Bruĝo, la Norda Venecio

▸ Lundo kaj merkredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 71

Bruĝo (Belgio) estas unu el la plej belaj urboj de Eŭropo kaj ĝia historia urbocentro estas Monda Heredaĵo de Unesko.

Matena promenado tra la arkitekturaj, historiaj kaj artaj monumentoj de la mezepoka kaj renesanca urbo. Manĝo en malnova bierfarejo kaj boata vizito de la urbo tra ĝiaj kanaloj. Libera tempo en la centro kaj reveno al Lillo. *Ne konsilinda por homoj kun marŝproblemoj.*

## E11 Parizo - historia

▸ Merkredo 8h00 – 21h00

Prezo: € 140

Antaŭ la renovigaj projektoj de Barono Haussmann kaj Napoleono la 3-a, Parizo estis urbo kun mallarĝaj stratetoj kaj diversstila arkitekturo. Dum pieda kaj metroa promenado, ni malkovros spurojn de la antikva Lutecia kaj mezepokajn domojn. Ni dividiĝos en grupetojn kaj sekvos tri sinsekvajn programerojn: Vizito de "la Conciergerie" (unua reĝa loĝejo en Parizo), restaĵo de la Palaco de la Civito kaj malliberejo dum la Franca Revolucio. Promeno laŭ la temo "Reĝoj kaj Revolucioj ĉirkaŭ la Bastilo". Piediro ĝis la Hôtel de Ville (urbodomo), nia rendevuloko.

Libertempo. Trajna iro al kaj reveno de Parizo. Lunĉo inkluzivigita.

*Ne taŭga por homoj kun marŝproblemoj pro longaj piediro kaj starado.*

## E12 Parizo - turisma

▸ Merkredo 8h00 – 21h00 Prezo: € 170

Malkovru la ĉefurbon de Francio kaj ĝiajn plej famajn vidindaĵojn!

Trajna vojaĝo de Lillo ĝis Parizo kaj busa promenado tra la urbo.

Vizito de la 300 m alta Eiffel-Turo, la kvartalo Bastilo, ŝippromeno kun tagmanĝo sur la rivero Sejno kaj rigardo al diversaj famaj parizaĵoj. Libertempo en la kvartalo Champs Elysées.



# Duontagaj ekskursoj

## D1 Lillo – Piedira vizito

▸ Sabato 14h30 – 16h00
Mardo 9h30 – 11h00    Prezo: € 8

Ni piediros tra diversaj kvartaloj kaj jarcentoj: la mezepoko, la Flandra Renesanco, la franca aneksiĝo fare de la "Sunreĝo" Ludoviko la 14-a, la aŭstra sieĝo dum la revolucio, ĝis la moderna industria jarcento. Interesaj anekdotoj kaj okazo por lerni iom da pikarda dialekto!

*Ne konsilinda por homoj kun marŝproblemoj pro longa piedirado.*

## D2 Lillo – Busa vizito

▸ Sabato kaj dim. 14h30 – 16h00
Lundo 9h30 – 11h00    Prezo: € 21

Busa iro de la centro de Lillo (Renesanca palaco, nun la Turisma Oficejo, kaj ĉefa placo kun diversepokaj monumentoj) al la malnovaj kvartaloj, la universitata kvartalo kaj la nova kvartalo Euralille. Vi pli bone komprenos la diversajn historiperiodojn de la urbo, ĝiajn etoson kaj vivarton.

## D3 Belarta Palaco – Lillo

▸ Dimanĉo kaj lundo
15h30 – 18h00    Prezo: € 10

Piediro (15 min.) ĝis la Palaco pri Belartoj de Lillo, unu el la plej gravaj de Francio kaj la plej granda regiona laŭ nombro de ekspoziciaĵoj. Pentraĵoj kaj artaj objektoj de la mezepoko kaj Renesanco, skulptaĵoj de la 19-a jarcento, kolekto de ceramikaĵoj (16-a ĝis frua 20-a jc), kabineto de desegnostampaĵoj kaj reliefaj mapoj de urboj fortikigitaj de Vauban. Komuna piediro reen al la kongresejo!

## D4 Muzeo de la Minejo – Lewarde

▸ Ĵaŭdo kaj vendredo
8h45 – 13h00    Prezo: € 35

Vizitu la historian Minejan Centron de Lewarde, la plej gravan minejan muzeon en Francio. Homa kaj industria aventuro atendas vin. Dum tri jarcentoj karbominado regis super la tuta vivo de la loĝantoj. Fakuloj klarigos pri la formiĝo de karbo profunde en la tero, la evoluo de la minejaj aparatoj, maŝinoj kaj vestaĵoj, sekurecaj helpiloj, frua utiligo de bestoj en la minado. Minejaj liftoj kaj vagonetoj transportos vin tra la ŝaktoj kaj subteraj koridoroj (malkonsilinda por klaŭstrofobaj homoj). Konatiĝo kun la ministaj simplegaj hejmoj kaj socia vivo. Vi komprenos ilian emon al komunaĵoj kiel muzikrondoj, politikaj kaj sindikataj kunvenoj.

## D5 Muzeo Louvre – Lens

▸ Lundo 9h00 – 13h00
Ĵaŭdo 14h00 – 18h00  Prezo: € 27

Louvre-Lens estas memstara publika muzeo ligita al la Pariza Louvre-muzeo, malfermita la 4-an de decembro 2012. Sen propraj kolektoj ĝi montras ekspoziciojn inter kiuj ĉefrolas la Tempogalerio (Galerie du Temps) kun gravaj artaĵoj el la Pariza Louvre. En la 120m longa galerio videblas verkoj el ĉiuj civilizacioj kaj teknikoj, kronologie prezentataj laŭ tri grandaj periodoj: 70 verkoj por la Antikveco, 45 por la Mezepoko kaj 90 por la Moderna Erao. Profesiaj esperantistaj ĉiĉeronoj gvidos vin komentante ankaŭ pri la regiono, pri la kulturpolitiko de Francio kaj pri la konstruo de la muzeo.

## D6 Muzeo La Piscine – Lillo

Mardo 10h00 – 13h00
Prezo: € 15

La Muzeo pri Arto kaj Industrio André Diligent, kromnomata "La Piscine" (La Naĝejo) staras sur la loko de la malnova *Art Déco*-naĝejo de Roubaix. En 1985 ĝi estis fermita pro sekureco kaj ĝi denove malfermis siajn pordojn, ĉi-foje kiel muzeo, en 2001. Ĝia kolekto havas skulptaĵojn, pentraĵojn (ofte de regionaj artistoj), teksaĵojn, objektojn *Art Déco* k.a. artaĵojn originale montratajn en la baseno mem, en la ĉirkaŭantaj iamaj duŝejoj.

Grupa transporto per metroo.

## D7 Bierfarejo Lepers – Centjara bierkulturo

Lundo kaj mardo
12h00 – 19h00 Prezo: € 59

Jam de 125 jaroj la familio Lepers produktas bierojn en sia moderna sed tradicia bierfarejo.

Gustumu la lokan bieron Angelus, kiu ricevadis plej altajn premiojn kaj kiun oni trinkas ekde 1905. Gustumu krome diversajn mondbierojn. Akompanos la gustumadon tipe flandra manĝaĵetoj.

La ekskurso montros, kia estas la flandra kunvivarto per lokaj kulturaĵoj, lokaj ludoj, surpriza memoraĵo ktp.

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

| | | Sab 25/07 | Dim 26/07 | Lun 27/07 | Mar 28/07 | Mer 29/07 | Ĵaŭ 30/07 | Ven 31/07 | Prezo EUR |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **E1** | Bulonjo (ceremonio) | | | | | T | | | 115 |
| **E2** | Bulonjo (Nausicaá) | | | | T | | T | T | 80 |
| **E3** | Bulonjo (Wimereux) | | | | T | | T | T | 60 |
| **E4** | Bulonjo (Malnova Urbo) | | | | T | | T | T | 60 |
| **E5** | Amieno kun lumspektaklo | | | | | T | | | 56 |
| **E6** | Ipro: Passchendaele (Belgio) | | | | | T | | | 55 |
| **E7** | Biciklado (memorlokoj) | | | | | T | | | 50 |
| **E8** | Vert'Tige – ekologia bieno | | | | T | | T | | 8 |
| **E9** | Araso (memorlokoj 1-a MM) | | | | | T | | | 50 |
| **E10** | Bruĝo, la Norda Venecio | | | T | | T | | | 71 |
| **E11** | Parizo - historia | | | | | T | | | 140 |
| **E12** | Parizo - turisma | | | | | T | | | 170 |
| **D1** | Lillo – Piedira vizito | P | | | M | | | | 8 |
| **D2** | Lillo – Busa vizito | P | P | M | | | | | 21 |
| **D3** | Belarta Palaco – Lillo | | P | P | | | | | 10 |
| **D4** | Muzeo-Minejo – Lewarde | | | | | | M | M | 35 |
| **D5** | Muzeo Louvre-Lens | | | M | | | P | | 27 |
| **D6** | Muzeo La Piscine – Lillo | | | | M | | | | 15 |
| **D7** | Bierfarejo Lepers | | | P | P | | | | 59 |

# Bankedo

La bankedo okazos en la salono "Jeanne de Flandres" en la kongresejo la 27-an de julio je 19h30. Vegetara varianto de la menuo estos havebla.

*Loka aperitivo Chuche Mourette*
Produktaĵo el nigraribaj kaj juniperaj beroj kun diversaj manĝaĵetoj.

*Norda paletro*
Viandpasteĉo *potjevleesch*, bovlangaĵo *lucullus*, fromaĝtorto, fromaĝfandaĵo Welsh de Ch'nord.
Regiona specialaĵo vianda kun freŝaj legomoj.
Loka fromaĝo Maroilles sur panrostaĵoj kaj endiviaj folioj.

*Sortimento de desertoj*

*Blanka kaj ruĝa vinoj. Gastrinkaĵoj. Minerala akvo. Kafo aŭ teo.**

Prezo: € 71

* Aldonaj trinkaĵoj estos pagendaj rekte al la restoracio.

# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

**44-a Internacia Infana Kongreseto**
25-a julio – 1-a aŭgusto 2015 en la farmbieno de la Ardeo, Villeneuve-d'Ascq (en la metropola regiono de Lillo).
Pliaj informoj, programo, kotizoj kaj aliĝilo: www.iik.lille2015.fr.

**71-a Internacia Junulara Kongreso**
2-a – 9-a de aŭgusto 2015 en Wiesbaden, Germanio.
Informoj en la TTT-ejo http://ijk2015.tejo.org kaj ankaŭ ĉe la TEJO-oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. +31 10 436 1044; retadreso: oficejo@tejo.org.

**48-a ILEI-Konferenco**
17-a – 25-a julio 2015 en Oostende, Belgio. Temo de la konferenco: "Renkontoj kun la historio, pensoj pri la paco".
Pliaj informoj, kotizoj kaj aliĝilo troviĝas en la TTT-ejo de ILEI: www.ilei.info.

### Simpozio de ISAE

23-a – 24-a julio 2015, Lillo, kontribue al la jubilea jaro "Montevideo 60" Internacia Scienca Asocio Esperanta organizas simpozion. Ĝi arigos scienc-amikojn kiuj interesiĝas kaj pri la lingva aspekto de la demokratiaj iniciatoj por publika kompreno pri la scienco kaj pri la agado de Unesko por internacia scienca kunlaboro survoje al daŭripova estonteco. Por pliaj informoj, kontaktu la prezidanton de ISAE: joseantonio.vergara@gmail.com

# Pliaj informoj

### Disdonado de propagandiloj kaj informiloj

Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon ktp. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en la dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado (bv. kontakti la CO de UEA). Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

### Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas.

Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate, kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj.

Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (400 eŭroj). Tiujn standojn kaj budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

### Kongresa Libroservo

Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: la Kongresa Libroservo. Multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

### Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas banka monĝiro. Bv. konsideri malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bv. ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco.

La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

• Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNANL2A) aŭ ING Bank, IBAN: NL93 INGB 0000 6273 37 (BIC: INGBNL2A);

• Je la nomo de Universala Esperanto-Asocio al la konto en:

Belgio: Bpost Bank, IBAN: BE54 0001 6318 3197 (BIC: BPOTBEB1XXX)

Germanio: Postbank, IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09 (BIC: PBNKDEFF)

Svedio: Nordea, IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740 (BIC: PBNKDEFF)

Svislando: Postfinance, IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0 (BIC: POFICHBEXXX).

De ekster Nederlando nepre aldonu 10 eŭrojn por la bankokostoj.

**Ĉekoj.** Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso. La ĉeko estu en eŭroj kaj nepre aldonu 25 eŭrojn por la bankokostoj. Prefere sendu ĉekojn titolitajn al unu el la bankoj en Nederlando. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago.

**Kreditkartoj.** Eblas pagi ankaŭ per Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la kartonumeron, ĝian validodaton kaj la 3 kontrolciferojn malantaŭe sur la kartoj (CVC-numero). Tiukaze bv. aldoni 5% al la pagata sumo por administraj kostoj. Por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

**Paypal.** Eblas pagi pere de Paypal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

## Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (ekzemple por loĝado, ekskursoj, bankedo) se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

## Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

• Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj en la Infana Kongreseto.

• Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

• Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

• Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.

• Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.

• Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

### Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. +31 (0)10 436 1044, fakso: +31 (0)10 436 1751; retadreso: kongresoj@co.uea.org.

*Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. La membroj de LKK ne traktas individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin.*

# Kongresaj perantoj

Se en via lando estas peranto, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al tiu. Se ne, bv. sendi la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

| | |
|---|---|
| Aŭstralio | Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016 |
| Aŭstrio | Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg |
| Belgio | Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine<br>aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen |
| Britio | Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE |
| Ĉeĥio | Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice |
| Ĉinio | Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing aŭ Trezoro Huang Yinbao, Jinqiao Touzi Gongsi, Esperanto-Centro (18893316800), Jingchuan-Xian, 744300 Nong Lin-Lu, Pingliang GANSU |
| Danio | Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København |
| Estonio | Ahto Siimson, Kastani vk. 12-11 Paikuse, 86602 Pärnu Maakond |
| Finnlando | Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki |
| Francio | Espéranto-France, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris |
| Germanio | Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz |
| Grekio | Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiou 83, 112 51 Athina |
| Hispanio | Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid<br>aŭ Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell |
| Hungario | Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest |
| Islando | Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík |
| Israelo | Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin |
| Italio | Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano |
| Japanio | Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô |
| Kanado | Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5 |
| Korea Resp. | Korea Esperanto-Asocio, 1601 (Gangbyeon Hansin Core), 18 Mapo-daero 4da-gil, Mapo-gu, Seoul - 121-703 |
| Kroatio | Boris Di Costanzo, ŝet. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija |
| Latvio | Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045 |
| Litovio | Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C |
| Nederlando | UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam |
| Norvegio | Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen |
| Nov-Zelando | David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753 |
| Pollando | Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz |
| Rusio | Miĥail Ĉertilov, Titova 6-24, 606211 Liskovo aŭ Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad |
| Slovakio | Ľubomír Fajth, Plevník 105, 018 26 Plevník |
| Svedio | Leif Holmund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå |
| Svislando | Poŝtĉekkonto 12-2310-0 je la nomo “Universala Esperanto-Asocio” |
| Usono | Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608 |

Ziko Marcus Sikosek

# Sed homoj kun homoj

**Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005**

Lige kun la centjariĝo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj okaze de la 90-a UK en Vilno (2005), UEA eldonis historian libron pritraktantan la plej grandan kaj gravan regulan eventon en la Esperanta movado.




Abunde ilustrita kaj informa verko, havinda por ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de Universalaj Kongresoj.

Bindita € 18,00; broŝurita € 12,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.